WIKIPEDIA

Konga lingvo

La **konga lingvo** (en propra lingvo: **kikongo**) estas afrika interkomunik- kaj komerclingvo parolata en suda Kongo Brazavila, sud-okcidenta Kongo Kinŝasa kaj norda Angolo de 8 milionoj da parolantoj. Ĝi havas multajn nomojn en konga lingvo mem, kiel *kikongo*, *kikongo ya leta*, *kileta*, *kituba* kaj *munukutuba*. Ĝia ISO-kodo estas kg. Ekzistas Vikipedio en la konga lingvo.


AVE MARIA, UAFULUKUA
YE NSAMBU, O
MFUMU SE UNA IAKU.
O NGE VANA VEN'AKENTO
NKUA NSAMBU
YO MALAU YE MBONGO A
VUMU KIAKU YEZU.
E SANTA MARIA,
NGU ANDI A NZAMBI,
INTUVINGIL'OIETO
ASUMUKI, OUAU YE MUNA
UTANGU'A
LUFUA LUETO. AMEN.

Kristana preĝo en la konga lingvo

konga	
Kikongo	
	
Disvastiĝo de konga lingvo	
Parolata en	Demokratia Respubliko Kongo Respubliko Kongo Angolo
Parolantoj	5 016 500
Denaskaj parolantoj	8 milionoj
Skribo	Latina skribo
Lingvistika klasifiko	
Niĝerkonga lingvaro	
Atlantik-konga lingvaro	
Benuekonga	
Bantuida	
Suda Bantuida	
Bantua	
Zono H	
Kikongo (H. 10)	
Konga	
Oficiala statuso	
Oficiala lingvo en	Demokratia Respubliko Kongo (Kongo Kinŝasa), Respubliko Kongo (Kongo Brazavila), Angolo
Lingvaj kodoj	
Lingvaj kodoj	
ISO 639-1	kg
ISO 639-2	kon

Enhavo

Deveno
Disvastiĝo
Referencoj
Eksteraj ligiloj

Deveno

Origine la konga lingvo estis interkomuniklingvo de etnaj kongoj, kiuj parolas multajn parencajn sed ne interkompreneblajn lingvojn, ekzemple *kilari*, *kindibu*, *kintandu*, *kisolongo*, *kisundi*, *kijombe*

kaj *ĉivili*. Aliaj etnoj adoptis la kongan lingvon dum konstruado de fervojo de Matadi ĝis Kinŝaso (1890-1898) kaj de Pŭantenŭaro ĝis Brazavilo (1924-1934), ĉar tiaj grandaj verkoj bezonis pli da laboristoj ol la konga regiono povis doni. Do multe da nekongaj popoloj kunlaboris kun la kongoj, kaj ili uzis la kongan interkomuniklingvon por interkomunikado.

ISO 639-3	kon
SIL	KON
Glottolog	core1256
Angla nomo	Kongo
Franca nomo	kikongo
	Vikipedio

Al la kreo de la konga interlingvo ankaŭ kontribuis la koloniistoj. Al ili estis malfacile lerni la multajn parencajn lingvojn, tiel ili kreis novan lingvon el la *kikonga*, nomita *kikonga de la ŝtato*.[1]

Disvastiĝo

La konga lingvo havas oficialan statuson en Kongo Brazavila, Kongo Kinŝasa kaj Angolo, kie ĝi estas nacia lingvo.

Referencoj

1. ↑ *Monato*, internacia magazino sendependa, numero 2000/05, paĝo 13: *Lingvo kaj politika povo* verkita de Zandandu Ntomono Zola.

Eksteraj ligiloj

- esperante Informoj pri la Konga lingvo (https://uea.org/vikio/kategorio:Konga_lingvo) en la vikio de UEA (https://uea.org/vikio/Ĉefpaĝo)
- Pri Konga ("makrolingvo") (http://www.ethnologue.org/show_language.asp?code=kon) en Ethnologue (angle)
  - Pri kongo, San Salvador (http://www.ethnologue.org/show_language.asp?code=kwy) en Ethnologue (angle)
  - Pri konga (Koongo) (http://www.ethnologue.org/show_language.asp?code=kng) en Ethnologue (angle)
  - Pri laari (http://www.ethnologue.org/show_language.asp?code=ldi) en Ethnologue (angle)
- Ekzemploteskto (http://www.language-museum.com/encyclopedia/k/kongo.php) en language-museum kun angla traduko
- *lengua kongo (http://www.proel.org/index.php?pagina=mundo/congokor/niger_congo/bantu/congo)* (konga lingvo) en Promotora Española de Lingüística (http://www.proel.org/) (hispane)
- Lingva Mapo de Centra Afriko (http://www.muturzikin.com/cartesafrique/carteafriquecentrale.htm) (angle, hispane, france)
- Lingva Mapo de malalta Zairo (http://www.proel.org/index.php?pagina=mundo/africa/zaireinf) (hispane)
- Serĉrezultoj (http://www.archive.org/search.php?query=Kongo) de Rosetta Project (http://www.rosettaproject.org/)

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Konga_lingvo&oldid=6913756"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 18:49, 11 mar. 2020.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.